

# La Progresanto

REDACTIE-  
COMITE  
G. P. DE BRUIN  
G. J. DEGENKAMP  
F. FAULHABER

STUDIEBLAD VAN DE BOND  
VAN ARBEIDERS-ESPERANTISTEN  
IN HET GEBIED VAN DE NEDERLANDSE TAAL  
f 2.- per jaar; f 1.50 voor leden van F.L.E.  
Postgiro 331133

W. F. KRUIT  
H. KUYT  
JAC. LEM JR.  
J. VAN SCHEEPEN  
H. VELTHOVE

REDACTIE EN ADM.: G. J. DEGENKAMP, ROELANTSTRAAT 4, AMSTERDAM-W.

## ABIO - PICEO - PINO

Ne miru, legantoj; ni ne celas doni botanikan lecionon, sed nur kelke da klarigoj pri tiuj ĉi tri arbonomoj.

Jus pasis la kristnaskofesto, kaj en multaj familioj oni aranĝis la tradician kristnaskarbeton. Ankaŭ en familioj esperantistaj. Kaj en tiuj ĉi stariĝis la tioman fojon la demando: ĉu la arbo tiucele uzata estas abio, piceo aŭ pino? La pli multaj homoj nur pale scias kio estas *den* kaj kio *spar* laŭ la respektivaj kruda kaj eleganta tipoj, sed ekzistas multaj koniferoj inter tiuj ekstremaj tipoj, kies nomon oni tute ne scias.

Konsultante vortarojn oni trovas, ke *pino* = *den*, *pijn*, *piceo* = *spar* kaj *abio* = *spar* kaj *den*, per kio la problemo fariĝas pli granda. Ni klopodos solvi por vi tiun aferon.

Ekzistas multaj specoj de koniferoj. Ili apartenas al proksimume 35 genroj, el kiuj la plej konataj estas *abio*, *piceo*, *pino*, *lariko* (*larix*, lork), *cedro* (*ceder*), *kupreso* (*cypres*), *araŭkario* (*tafeltjesden*), *taksuso* (*taxis*), *tujo* (*thuja*), *junipero* (*jeneverbes*), *sekojo* (*reuzenspar*). La genroj *abio*, *lariko*, *piceo*, *pino* estas inter si tre parencaj, kaj eĉ kompetentuloj intermiksas kelkajn specojn, kvankam ili ekkonas la specojn de tiuj genroj laŭ certaj karakterizaĵoj, pri kiuj laiko ne havas komprenon.

Larikon oni ĝenerale tuj ekkonas laŭ la okultrape apartigitaj foliogrupoj. Krome ĝi estas la sola konifero, kiu vin tre perdas siajn foliojn. Ĉiuj ceteraj nomiĝas por la laiko *den* aŭ (kaj) *spar*.

Kroma malfacilaĵo estas, ke internacie ne ekzistas unueco pri tiuj nomoj. Nia *spar* (*abio*) estas germane *Tanne*, france *sapin*. *Piceo* (ankaŭ *spar*) estas germane *Fichte*, france *pešsè*, kaj *pino* nomiĝas germane *Kiefer*, france *pin*. Kaj la anglo ofte nomas *abio*, kion ni nomas *piceo*, kaj inverse.

*Den* kaj *spar* estas nur popolnomoj. Ĝenerale *dennen* estas krudaj, ne tre elegante kreskantaj specoj; *sparren* delikatfoliaj, elegantaj, supren pintiĝantaj arboj.

Karakterizaĵoj de la tri genroj estas precipe la jenaj:

*Abio*; la tipa formo estas nia *silverspar*. La folioj troviĝas dvice, kombilforme sur la branĉoj, preskaŭ neniam unu kontraŭ alia aŭ krucforme. La fruktoj staras rekte supren, kaj ĝiaj skvamoj estas maldikaj kaj ne dikiĝas ĉe la ekstremajo.

*Piceo*; la tipa formo estas nia *tijne spar*. La folioj troviĝas unu kontraŭ alia aŭ krucforme, nur malofte nerugule sur la branĉoj, kaj ili estas tre mallongaj kaj akrapintaj. Senfoliigita branĉo similas raspilon. La fruktoj pendas kaj havas iom pintajn maldikajn skvamojn.

*Pino*; la tipo estas nia *grove den* aŭ *pijnboom*. La folioj estas longaj kaj troviĝas 2—5 kune en ingeto sur la branĉoj. La fruktoj estas tuj rekoneblaj laŭ siaj skvamoj, kiuj kvazaŭ ŝildfome dikiĝas ĉe la rando.

La speco ĝenerale uzata por nia kristnaska arbedo estas *Picea excelsa* (altkreska *piceo*), nia *tijne spar*.

**Varbu abonantojn por „La Progresanto“!**

## POR KOMENCANTOJ

H. Kuijt.

Vertalingen zende men voor de 10e van de volgende maand aan het redactie-adres: Roelantstraat 4, Amsterdam-W.

### WEDERKERENDE BEZITTELIJKE VOORNAAMWOORDEN. III.

In het vorige nummer werd het gebruik van „sia” in enkelvoudige zinnen behandeld. Samengestelde zinnen bestaan uit twee of meer volzinnen, bijv.: *La patro perdis la lernolibron de sia filo, pro tio la filo ne povis fari sian taskon.* Deze twee volzinnen worden ieder apart ontleed. Het blijkt dan dat „sia filo” betrekking heeft op het onderwerp van de eerste volzin, n.l. „la patro”; „sian taskon” heeft betrekking op het onderwerp van de tweede volzin, n.l. „la filo.” Er komen samengestelde zinnen voor, die bestaan uit een hoofdzin en een bijzin; bijv.: *La patro konsilis al la filoj, ke ili bone atentu siajn librojn.* In zo'n bijzin is het onderwerp vaak verzwegen, bijv.: *La patro konsilis al la filoj, bone atentu siajn librojn.* Bij het ontleden moet men nauwkeurig nagaan waar het gezegde van de bijzin betrekking op heeft, dus: wie of wat een mogelijke verrichter van de handeling kan zijn. Gemakkelijk vindt men dan in bovenstaande zin het onderwerp „filoj” of „ili”. In ons voorbeeld heeft „sia” dus betrekking op het verborgen onderwerp van de bijzin. Nog een voorbeeld: *La bibliotekisto petis al kelkaj membroj, ke ili (kelkaj membroj) formetu liajn librojn.* Na het ontleden wordt de zin: *La bibliotekisto petis al kelkaj membroj, ke ili (kelkaj membroj) formetu liajn librojn.* Met „liaj libroj” worden dus niet de boeken van het onderwerp (*ili*) bedoeld, maar de boeken van de bibliotekisto. Zouden hier boeken van de leden bedoeld worden, dan zou de zin luiden: . . . ., *ke ili formetu siajn librojn*, of met verzwegen onderwerp: . . . ., *formetu siajn librojn.* Men bestudere aandachtig de volgende voorbeelden en probeer de verzwegen onderwerpen te vinden: *Li petis al siaj amikoj, eniri lian loĝejon.* *La patro ordonis al sia filo, purigi siajn ŝuojn.* *Bati sian edzinon, estas kruele.* *La instruisto ne permesis al la infanoj, forlasi sian lokon.* *La infanoj petis al la patrino, aŭskulti iliajn kantojn.* Soms wordt niet slechts een onderwerp verzwegen, maar is er ook van een handeling of toestand sprake, welke verborgen is in een bijvoeglijk naamwoord.

Ook dan make men bij het ontleden de zin compleet, bijv.: *Li parolis en lingvo, (kiu estas) fremda al liaj aŭskultantoj.* *La knabo ne ŝatis la kostumon, (kiu estas) jus aĉetitan por li de lia patro.* *La instruisto laŭdis la lernantojn, (kiuj estas farintaj) farintajn siajn taskojn.*

Ter vertaling. Opgave 1.

Het is de plicht van iedere man, voor zijn vrouw en kinderen te zorgen. Marie kon haar vreugde niet verbergen. Vader verbiedt zijn zoon, weg te gaan in zijn nieuwe costuum. Jan wist heel goed, dat de mensen niet hielden van zijn hond. Mijn vader werkt met zijn vriend in zijn tuin. (Op twee manieren te vertalen: eerst wordt de tuin van vader bedoeld, daarna de tuin van zijn vriend). Ik heb gezien, hoe ijverig zij haar lessen bestudeert. Als Piet wat beter had opgelet, zou hij nu zijn les kennen. Het is wenselijk, dat men zijn taken netjes maakt. Op zee dreef een klein bootje met een kind er in. Vele mensen denken, dat hun mening de juiste is. Toen Jan thuis kwam, was zijn vader reeds vertrokken.

Vertaling van opgave 11.

Mi neniam konis 1) miajn gepatojn 2); ili mortis junaj 3). Ĉu vi jam vidis ilian novan domon? Ĝi estas ĵus 4) konstruita 5). Nek li nek lia frato estas esperantistoj. Se vi konus 6) iliajn zorgojn 7, vi certe helpus ilin. Pli atentu 8) vian skribon 9), ĝi estas ĝenerale malbona 10). Johano kaj Petro estas ambaŭ esperantistoj; Johano estas la pli kapabla 11). Neniam mi vizitis Parizon, la ĉefurbon 12) de Francio. Ĉu vi vidis 13) mian italan gaston? Bedaŭrinde 14), mi ne rekontis italon 15). Niaj pragepatroj estas ĝermanoj 16). Multaj ĝermanoj lernas Esperanton, la mondlingvon 13). Post kiam ili manĝis 17), la patrino lavis 18) la manĝilaron.

1) Onnodig lang en stug: *estas koninta*; vooral niet . . . *intaj*, „mi” is immers enkelvoud. 2) Niet zontder N; al begint men de zin met deze bepaling, het blijft een bepaling zonder voorzetsel. 3) Niet: *june*; d.i. een bepaling van gesteldheid van het onderwerp tijdens de handeling. 4) Niet: *ĝuste*; men vergelijkte: *Li eksidis ĝuste* (juist, precies) *antaŭ mi.* *Ĵus* (zo juist, zo even) *li venis el Parizo.* 5) Ook: *finkonstruita*. 6) Ook: *sciuss*. 7) Niet: *zorgaĵojn*. 8) Ook: *dediĉu (donu) pli da atento al via skribo, prizorgu pli bone vian skribon*. 9) Niet: *skribaĵoj*;

## PRI LA REFLEKSIVA PRONOMO

Antaŭe kelke da vortoj pri la rilata pronomo. Ĝi estas vorto, kiu en dependa propozicio anstataŭas substantivon el la ĉefa propozicio, aŭ eĉ la tutan ĉefpropozicion. Ekz.: *la homo, kiu jus venis, estas nia prezidanto*. La vorto „kio“ troviĝas en la loko de „homo“ por eviti, ke ĉi tiu vorto aperu dufoje en la kunmetita frazo. Se ni demandas: al kiu (kio) rilatas la rilata pronomo?, ni respondas: al tiu (tio), kiu (kio) estas nomita en la ĉefa propozicio.

Gramatike ĝi indikas la trian personon. La respondo al „kio?“ (kio?) ĉiam povas esti „tiu“ (tio), kaj poste ni precizigu ĉi tiun respondon al la celita persono aŭ objekto. *La knabo, kiu kantas, estas mia frato*. Kiu kantas? „Tiu“, t.e. la knabo. *Mi, kiu venis unua, povis serĉi bonan lokon*. Kiu venis unua? „Tiu“, t.e. mi.

Ĉu gravas, ke ni sciu, ke gramatike la rilata pronomo indikas al la tria persono? Jes, kvankam nur malofte. Nome en tiuj dependaj propozicioj, kiuj post-

ulas refleksivan pronomon, ĉar tiukaze oni ofte eraras pri la persono kaj pri-traktas la rilatan pronomon, kvazaŭ ĝi estas tute identa al la antecedito. Baghy skribis: „Ĉu mi ludas komedion, kiu *sin* humiligante antaŭ militkapito...“ Prave li skribis „sin“ kaj ne „min“, ĉar „sin“ rilatas al „kio“, sed ne al „mi“ el la ĉefa propozicio. Ĉe la sama aŭtoro ni trovis „Mi, malestiminta ankaŭ *sin* mem“. La signifo ja estas: *mi, kiu malestimas ankaŭ sin mem*.

Ke ne ĉiuj aŭtoroj opinias same, provas la du sekvantaj frazoj de St. Engholm: „Mi estas malica virino, kiu meritas *mian* sorton.“ kaj: „Ni, kiuj devas kaŝi *nin*“.

Kompreneble ĉiu verkisto rajtas havi propran opinion pri iu gramatika problemo. En ĉi tiu kazo, samkiel en ĉiuj aliaj, oni tamen ĉiam konsekvence apliku la gramatikan regulon, kiun oni mem opinias bona, por ke verko aŭ traduko ne donu impreson de dubo aŭ nescio de la verkinto. J. van Scheepen.

## OPINIOJ EL NIA LEGANTARO

Pri nia artikolo en la novembro numero Pro kio ni gramatikumas?“ k-do A. P. M. Lafeber atentigas, ke ankaŭ pri naciaj lingvoj oni multe gramatikumas; kaj li aldonas ke „tio estas ĝojiga fakto, ĉar lingvo, por kies pureco ne interesiĝas ĝiaj uzantoj, jam ne estas viva lingvo.“ Tre prave! Ni nur aldonu, ke ekzistas diferenco en gramatikumado pri naciaj lingvoj kaj pri Esperanto. En la unuaj oni klopodas teni la lingvon pura kontraŭ dekadenco; la gramatikumuloj estas ĝenerale konservemaj. En Esperanto, kontraŭe, ekzistas pli da progresemaj ol da konservemaj fortoj.

Tio estas komprenebla, ĉar Esperanto ne havas tiom longan tradicion kiel la naciaj lingvoj, kaj multaj lingvaj elementoj ne estas jam tiom rigore fiksitaj.

Sed k-do L. demandas al si: „Ĉu ĉiu maniero de gramatikumado estas prosperiga por la lingvo, ĉar oni gramatikumas laŭ tre diversaj manieroj?“

Jam ofte ni konstatis tion en L.P. Sed du aŭ pli interdiskutas pri iu lingva problemo, ni tiru el tiu fakto instruan konkludon: ĝenerale nek unu, nek alia plene pravas; ĉiu rigardas la aferon tra siaj okulvitroj, kun koloro nacia aŭ logika, tradicia aŭ progresema, ortodoksa aŭ vastrigarda. La vero, la faktoj havas diversajn aspektojn. Ni klopodu kompreni tiujn aspektojn, eĉ se ni mem ne vidas ilin. Kaj ni klopodu, sen fordoni de la propra opinio, ĉerpi el ĉies konsidero ion bonan. Nur unu afero povas malutili al la lingvo: lingva fanatikeco!

bedoeld wordt „het schrijven“, de handeling dus zelfstandig voorgesteld. Ook: *skribado*. 10) Niet: *malbone*; men noemt hier een kenmerk. 11) Ook: *sperta*; minder juist: *lerta*; d.i. handig. 12) Niet zonder N; een bijstelling komt in dezelfde naamval te staan als het zinsdeel waarop zij betrekking heeft; men vergelijkte: *Mi iros al Londono, la ĉefurbo de Anglio. Ĉu vi vidis Rejnon, la grandan riveron?* 13) Ook: *eble vidis*. 14) Niet: *je mia bedaŭro*; d.i. een woordelijke overzetting uit enkele talen. Ook: *mi bedaŭras*. 15) Niet: *italianon*; de lands-

naam is afgeleid van de volksnaam, evenals: *franco, dano, germano, anglo* enz. 16) Niet: *germano*; d.i. duitser. 17) Ook: *estis mangintaj*.

Beoordeling: Astor 10, J. F. v. D. te A. 9, D. K. te Z. 9, E. A. B. te A. 10, D. V. te H. 9, J. C. M. te U. 8, G. A. te H. 9, D. P. te A. 8, H. J. K. te B. 10, C. v. B. te S. 9, P. W. te Z. 7, H. H. te R. 5, P. W. W. te G. 7, M. K. te A. 5, A. B. te A. 8, Tilio 7, A. A. D. te Z. 9, J. A. V. te U. 7, A. J. G. te D. 8, J. J. B. te D. 8.

## KIO OKAZIS EN 1949!

Jarkroniko pri la Esperanto-movado.

G. P. de Bruin.

*Tutmondaj asocioj.* Ni komencas nian kronikon per raporteto pri niaj tutmondaj asocioj. Le plej aĝa el ili estas „Universala Esperanto-Asocio (U.E.A.) kaj tial ni donas al ĝi la unuan lokon.

Pasintjare (1949), en la fino de septembro, U.E.A. nombris 12630 membrojn, inter kiuj 6893 asociaj (kiuj aliĝis aŭtomate pro la aneco al sia landa asocio) kaj 5737 individuaj (kiuj pagas apartan kotizon al U.E.A. kaj ricevas la jarlibron kaj (aŭ) la gazeton). En la sama tempo en 1948a la tiurilataj ciferoj estis respektive 15265, 9249 kaj 6016. Komparante la nomitajn ciferojn, oni konkludus grandan malkreskon, sed ne maltrankviliĝu! Nura komparo de la tiutempaj ciferoj ne donas ĝustan bildon pri la efektiva stato. En septembro 1949a ne ĉiuj aliĝintaj asocioj jam pagis sian kotizon, kaj pro tio granda nombro da membroj ne estas enkalkulita en la nombro da asociaj membroj. Ĉar ni ankoraŭ ne disponas pri la ciferoj el la fino de la jaro, ni ne povas konstati, ĉu U.E.A. progresis aŭ ne en la pasinta jaro. Anstataŭe ni donas ĉi tie por komparo la nombrojn el kelkaj pri fruaj jaroj:

1945	—	asociaj membroj: 4675,	individuaj membroj: 3591,	entute: 8266;
1946	—	asociaj membroj: 9950,	individuaj membroj: 5810,	entute: 15760;
1947	—	asociaj membroj: 8995,	individuaj membroj: 7009,	entute: 16004;
1948	—	asociaj membroj: 11587,	individuaj membroj: 6120,	entute: 17707.

La 34a kongreso okazis en Bournemouth, de la 6a ĝis la 13a de aŭgusto. Ĉeestis pli ol 1400 personoj el 34 landoj. Multaj samideanoj el orient-eŭropaj landoj ne povis partopreni; nur kelkaj delegitoj de tie ricevis permeson por elvojaĝo. Oficiale reprezentitaj estis la registaroj aŭ ministerioj de Aŭstralio, Brazilo, Belgio, Ĉeĥoslovakio, Italio, Nederlando, Norvegio, Svedio kaj Svisio. Supozeble tiuj reprezentantoj tamen mem pagas siajn vojaĝkostojn! Inter la ĉeestantoj estis ankaŭ s-ino Wanda Zamenhof, kiu salutis en la nomo de la familio Zamenhof. Oficiala interesiĝo montriĝis i.a. per dufoja ĉeesto de la urbestro, per publikigo fare de la poŝto de 12-paĝa informlibreto de poŝtaj tarifoj, per senpaga disponigo de tramoj kaj aŭtobusoj al ĉiuj kongresanoj kaj pro la fakto, ke du reprezentantoj de la Instru-Ministerio ĉeestis kunsidon de la Komitato de U.E.A.

Tute nova aranĝo estis oratora konkurso pri la temo „kiel gajni la junularon?“ Preskaŭ la duono de la kongresanaro ĉeestis la paroladojn kaj la sekvantajn diskutojn.

En la kadro de la Somera Universitato okazis serio da interesaj prelegoj, i.a. pri *Demokrata eduko*, *La detektiva romano*, *Frederiko Chopin* (kun muziko) kaj *Artistoj de la Itala Renesanco*. Laŭ Hans Jakob ĉi tiuj prelegoj apartenis al la plej allogaj partoj de la kongresa programo.

Ke krome okazis kiel kutime diversaj amuzaj (ekskursoj, internacia bako, varieteo kaj koncerto) kaj pluraj fakaj kunvenoj, i.a. de Blinduloj, Instruistoj, Scienculoj, Katolikoj, Kooperativanoj, Literaturamantoj, Pacifictoj, Journalistoj kaj Socialistoj, ni mencias nur komplete.

Nia priskribo ne estus plena, se ni ne nomus la Antaŭkongreson en Londono, kiu ebligis al siaj relative multaj partoprenantoj ekkoni la britan ĉefurbon kaj ĝian vivon.

Laŭ la Jarlibro de 1449a U.E.A. havis tiun jaron 2224 delegitojn en 56 landoj. La gazeto „*Esperanto*“ estis legata en 65 landoj. La Petskribo al UNESCO atingis 16.350.212 subsekribojn, el kiuj 895.432 estis individuaj kaj 15.454.780 kolektivaj. Kvankam UNESCO sin provizore versaĵne ne okupas pri la demando de lingvo internacia, la rezultato tamen havas propagandan valoron.

Novan propagandan entreprenon komencis U.E.A. per aranĝo de Internacia Prelega Vojaĝo. Disponigis sin por tio prof. d-ro I. Lapenna el Jugoslavio, kiu komencis sian taskon en Francio kaj tie jam faris sukcese paroladojn en diversaj lokoj kaj antaŭ diversspeca publiko.

(Daŭrigota)

## DE KOMENCANTO AL PROGRESANTO

Jac. Lem.

Mocht dit zijn.

Een vernietigende blik werpen op.

Over het hoofd zien.

Voldoen aan.

De hand aan zichzelf slaan.

... wil maar niet uit mijn hoofd.

Vernietiging.

Goede vruchten voortbrengen.

Wie het eerst komt, het eerst maalt.

Toekennen.

De schouders ophalen.

Het verzenmaken gaat mij niet goed af.

Lenen van; lenen aan.

Loop niet te hard van stapel.

Gehecht zijn aan.

Uitstrooien.

Bolwerk.

Te loor gaan.

Zielsveel.

Vruchtbaar.

Een steen des aanstoots.

Opgave 1.

1. Loop niet te hard van stapel, wees vriendelijk, maar niet te lichtgelovig. Leen niet aan en leen niet van, want door het lenen aan verliest men vaak, behalve zijn have (hav(a)jo), ook zijn vriend; en het lenen van leidt tot vernietiging van je eigen onafhankelijkheid. 2. Zijn moeder hield zielsveel van hem en ook ik was zeer aan hem gehecht. Je kunt dus wel begrijpen hoe smartelijk het bericht ons trof, dat hij de hand aan zichzelf had geslagen. 3. De regering kende die vereniging een grote som gelds toe ter bestrijding van de tuberculose. 4. Men heeft mij verzocht een gedichtje te schrijven ter gelegenheid van zijn jubileum. Ik geloof echter niet, dat ik aan die wens zal kunnen voldoen, want het verzenmaken gaat mij niet goed af. 5. Er zijn nog enkele plaatsbewijzen beschikbaar. Haast u dus! Wie het eerst komt, het eerst maalt. 6. Het liedje, dat ik gisterenavond heb gehoord, wil maar niet uit mijn hoofd. 7. Als enig antwoord haalde zij de schouders op en wierp een vernietigende blik op haar belager. 8. Mocht dit een steen des aanstoots zijn, laten wij die (dan) verwijderen, opdat niets onze harmonie verstore. 9. Wij moeten echter niet over het hoofd zien, dat het moeilijkst te overwinnen bolwerk, het bolwerk der onwetendheid is. 10. Zeker, een deel van het uitge-

Se tio estas .

Ĵeti kondamnan rigardon sur.

Ignori.

Plenumi.

Sinmortigi.

... nepre ne volas elkapiĝi.

Ruino.

Kreskigi bonajn fruktojn.

Kiu pli frue venas, pli frue muelas.

Asigni.

Levi la ŝultrojn.

La versarado ne prosperas al mi.

Pruntepreni; pruntedoni.

Ne donu tuj al ĉiu penso faron.

Esti ligita al.

Disĵeti.

Bastiono; remparo.

Forperdiĝi.

Varmege.

Fekunda

Ŝtono de falpuŝiĝo.

strooide zaad zal te loor gaan, maar bedenck: een ander deel zal in vruchtbare aarde vallen en goede vruchten voortbrengen.

Vertaling van opgave 12.

1. Mallonge kaj koncize: ekspeĉu vin kiom eble plej baldaŭ kaj ne risku denove veni antaŭ miajn okulojn. 2. Kiam mi ricevis (ricevante) vian peton, mi ĝuste havis subplume artikolon pri tiu temo. Mi ĝustatempe havigos al vi la manuskripton. 3. Kian intereson tio havas por vi? Ĉu vi opinias povi esplor-demandi min? Ne kredu! Mi nenion scias kaj se mi sciis ion, mi nepre silentus. 4. Evidente ĉie li estas persekutata de la fatalo. Lin trafas malprospero post malprospero. Estas, kiel diras la proverbo: kiam venas la suferoj, ne izolita ili venas. 5. Vi agos prudente, prinpensu: ne en unu tago elkreskis Kartago.

Bonvolu korekti sur paĝo 95a, unua kolono, 2a linio de malsupre: *snelheid* d.e. *eenheid*.

Beoordeling: H. J. H. Jr. en B. 9; P. M. W. en G. 6; E. A. B. en A. 8; G. A. en R. 8; D. K. en Z. 9; E. R.-M. en S. 8; A. J. G. en D. 8; Astor 8; M. en U. 7; J. v. R. en R. 8; J. A. V. en U. 5; C. B. v. G. en 's-G. 7; D. P. en A. 5; J. F. v. D. en A. 8; D. V. en H. 7.

WERFT ABONNE'S VOOR

„LA PROGRESANTO”

## POR PROGRESANTOJ

J. van Scheepen.

Vertalingen zende men voor de 10e van de volgende maand aan het redactieadres: Roelantstraat 4, Amsterdam-W.

Opgave 1. Vertaal in Esperanto:

De poolnacht ging voorbij. De mannen gebruikten die tijd voor het treffen van allerlei voorbereidingen en het aanbrengen van vele verbeteringen aan de uitrustingsstukken. Eindelijk was dan het ogenblik gekomen waarop ze op weg konden gaan.

Aanvankelijk ging alles goed, maar al gauw weigerden de twee motorsleden. De ponnies 1) konden het klimaat niet verdragen en moesten worden afge- maakt.

Toen kwam alles aan op de honden en de mannen zelf. Onderweg werden nog vele depôts ingericht en steeds weer keerden kleine groepjes terug naar de uitgangsbasis. Tenslotte waren er nog maar acht mannen over. Kapitein Scott was aanvankelijk van plan geweest om slechts met vier man naar de pool te trekken, maar allerlei overwegingen deden hem er tenslotte toe besluiten om dat getal op vijf te brengen. Het was een moeilijke keus. Alle mannen waren hem evenzeer toegewijd en ze waren zonder uitzondering voor hun taak berekend.

(Met Scott naar de Zuidpool.)

1) *poneo*.

Vertaling van opgave 11.

LA PACO DE MUNSTER.

Baldaŭ 1) post la morto de la regiona reginto 2) Frederiko Henriko sekvis la paco de Munster, per kiu (. . . kaj) Hispanio kaj la Regno agnoskis la aŭtonomoron 3) de la Respubliko 4 (1648a). La navigacio al 5) Orienta Indio 6) kaj la trafiko inter sudokcidenta kaj nord-

orienta Eŭropo estis preskaŭ ekskluzive 7) en la 8) manoj de la hollandanoj 9). Iliaj 10) fiŝkaptado, maristaj aferoj kaj manifakturoj superis tiujn el ĉiu ajn 11) lando kaj laŭ 12) kapitalriĉeco ili superis eble 13) tutan Eŭropon. Kaj ĉi tiu materia (re)florado pariĝis 14) al spirita, same neordinara kaj senekzempla 15) laŭ formo kaj enhavo kaj komparebla nur kun la same subita kaj miriga 16) riĉeco de talent(uloj)oj en 17) Athene de la 5a jarcento antaŭ nia jarkalkulado 18).

1) Ook: *mallonge, mallongan tempon, mallongtempe, nelonge*. 2) Voor dit specifieke Nederlandse woord kunnen we ook de vertalingen *guberniestro, gubernatoro* bezigen. 3) Ook: *aŭtonomecon, sendependecon*. 4) Denk om de *s* in *Respubliko*. 5) Niet: *sur*. 6) Niet: *Hindio*. Tegenwoordig ook: *Indonezio*. Ook: *Insulindo* is wel gebruikt. 7) Ook: *tute*. 8) Met lidwoord. 9) Ook: *nederlandanoj*. De vertaling „hollandanoj” is echter beter, daar het hoofdzakelijk Hollanders waren. Met dubbele *ll*. 10) Met meervouds-*j*. 11) Ook: *alia*. 12) Niet: *en*. Ook: *koncerne, rilate*. 13) „Wel” wordt niet vertaald. 14) Ook: *estis akompanata de*. 15) Ook: *modela*. 16) Niet: *mirinda*. 17) Het lidwoord voor een eigennaam blijft gewoonlijk onvertaald. In de practijk komt men het in dergelijke gevallen wel tegen. 18) Ook: *ero, erao*.

Beoordeling; H. J. H. te B. 8; J. R. te A. 8; C. J. P. te Z. 6; G. B. te Z. 7; A. J. G. te D. 6; G. C. de G. te U. 7; F. v. d. M. te U. 6; P. W. W. te Gr. 6; A. A. D. te Z. 5; Kortbirde 8 (antaŭa tasko: 8); J. J. S. te H. 8; E. R. M. te S. 7; A. P. M. L. te G. 8; A. B. te A. 5; E. A. B. te A. 8; J. F. v. D. te A. 8; D. K. te Z. 8; Astor 8; G. A. te H. 7; J. C. M. te Z. 8.

## NEOLOGISMOJ

Neologismoj ĉerpitaj al literaturaj eldonoj de F.L.E.

„LA VOJOJ ESTAS NEKONATAJ”,

L. Kassák

adoleska — vir(in)iĝanta (adolescent, aankomend)

belfrido — observa kaj alarma urboturo (belfort)

filero — hungara monereto, veloranta centonon de krono (filler)

hallo — interjekcio, esprimanta alvokon, peton pri atento aŭ saluton (hallo)

kviki — pepegadi

refreno — interstrofa rekantajo (refrein)

sibilo — mitologia antaŭdiristino, anoncanta la dezirojn de la dioj (sibylle)

tinunkulo — speco de falko (torenvalk, Falco tinnunculus)

uzino — fabriek(eg)lo, komplekso de fabrikoj (bedrijf)

## LA HOMA KORPO

B. Rijpstra

LA SKELETO (Daŭrigo)

La kranion (fig. 11 in n-o 2) formas: fruntosto, 2 perietostoj (flankoj kaj supra parto kun du tuberoj sur atlazo por kapjesi), 2 tempioj, sfenoido (inter frunto kaj frunto), etmoido (inter frunto kaj sfenoido).

Fruntosto, sfenoido kaj etmoido formas la fundon de la kranio.

La vizagaĵ ostoj estas:

supra makzelosto, palatosto, 2 nazostoj, 2 larmostoj, 2 zigomostoj, malsupra makzelosto (mandiblo) kaj langa ostoj. Plugferforma osteto dividas la nazon en 2 partojn.

Etmoido = zeebeen  
 fruntosto = voorhoofdsbeen  
 langa ostoj = tongbeen  
 larmosto = traanbeen  
 makzelosto = bovenkaak  
 mandiblo = onderkaak  
 nazosto = neusbeen  
 pariet(ost)oj = wandbeen, kruinbeen  
 plugferosto = ploegbeen, neusmidschot  
 okcipit(ost)oj = achterhoofdsbeen  
 sfenoido = wiggebeen (inter tempio kaj frunto)  
 tempio = slaapbeen  
 zigomosto = jukbeen (tempiarka ostoj)

(Daŭrigota)

## DE WERKWOORDEN

AFGELEIDE WERKWOORDEN

3. *Werkwoorden, afgeleid van bijvoegl. naamwoorden.*

(Vervolg)

Het bijvoeglijk karakter dezer afleidingen brengt mee, dat slechts enkele zodanige werkwoorden overgankelijk gebruikt kunnen worden. Als overgankelijk kunnen beschouwd worden:

Atenti x	Kapabli
Avari	Kuraĝi
Avidi	Potenci
Ĉarmi	Reciproki
Egali x	Simili x
Ĥkskluzivi	Soleni
Favori	Sperti

Hieronder laten we een aantal onovergankelijke afleidingen volgen, die hier en daar in de literatuur voorkomen en treffend een schakering van betekenis weergeven, wat zonder een werkwoorde-lijke vorm onmogelijk ware geweest:

Abrupti	Certi
Absurdi	Diligenti
Abundi	Ebeni
Afabli	Ebli
Agrabli	Ebrii
Aĝi	Evidenti
Akri	Facili
Aktivi	Feliĉi
Akurati	Fideli
Akuti	Fieri
Amari	Flavi
Analogi	Frenezi
Arbitri	Frivoli
Beli	Fruu
Blanki	Furiozi
Blui	Gaji

Gravi	Necesi
Gusti	Nigri
Humili	Obstini
Identi	Ofti
Indi ov.	Pali
Intimi	Paraleli
Inversi	Pedanti
Justi	Pleni
Jaluzi	Pravi
Kaduki	Preti
Koketi x	Proksimi
Kompetenti	Rapidi
Kompleti	Ruĝi
Konformi	Ruzi
Kontenti	Sani
Kontinui	Sereni
koopperi	Sati
Kripli	Seriozi
Krueli	Severi
Kruti	Sovaĝi
Kulpi x	Spriti
Kurbi	Sufiĉi
Kvieti	Trankvili
Kviti	Utili
Lami	Validi
Lerti	Vani
Longi	Varmi
Majesti	Veri
Malici	Verdi
Maturi	Vigli
Miopi	Volonti x

4. *Werkwoorden van voorzetsels afgeleid.*

Het voorzetsel drukt de verhouding uit van een zelfstandigheid of een werking ten opzichte van een andere zelfstandigheid. Uit het karakter van het voorzetsel zou men mogen afleiden, dat een werkwoord met een voorzetsel gevormd

## KION DIRAS LA ALIAJ!

Ne ĉiu leganto povas permesi al si la lukson legi diversajn Esp.-gazetojn. Generale tiuj gazetoj estas dediĉitaj al aferoj propaganda, organiza k.s. kaj nur neregule ili aperigas lingvajn artikolojn kun komuninteresa enhavo.

Antaŭ la milito ekzistis kelkaj gazetoj speciale dediĉitaj al studado; nuntempe L.P. estas sola tia revuo.

Por ke ankaŭ niaj legantoj estu iom informitaj pri tio, kion diras la aliaj, ni ĉerpos de temp' al tempo el ili la plej gravajn legindaĵojn sur lingva tereno, kaj laŭnecese komentos ilin.

En „Franca Esperantisto” s-ro ĵ. R. G. Isbrücker, la prezidanto de la Akademio de Esperanto, argumentas, ke Esperanto, kvankam lingvo vivanta, tamen certgrade diferencas de naciaj lingvoj, precipe pro tio, ke ĝi ankoraŭ ne atingis sian idealon de oficiala rekono kaj de ĝenerale enkonduko. La aŭtoro plendas, ke la esperantistoj ne sufiĉe rekonas kaj konscie aplikas la principojn de reguleco, logikeco kaj unueco. Precipe la

tria principo: unueco, havas lian zorgon, ĉar s-ro Isbrücker timas, ke la uzado de ĵuj ne ĝenerale aprobitaj formoj, ekz. de la sufikso „io” kaj de „tiom” kaj „kiom” por grado anstataŭ „tiel” kaj „kiel”, fine kondukos al skismo en la lingvo.

Kvankam ni komprenas la zorgon de la prezidanto de la Akademio, ni tamen ne partoprenas en lia timo. Ni povas iom bedaŭri, ke ne ĉiuj esperantistoj aplikas la samajn formojn; vidi en tiu fakto danĝeran fenomenon ni ne povas.

La tempo, en kiu Esperanton efektive minacas disfalo en dialektojn pro la reformemo de kelkaj ambiculoj, jam antaŭ longe forpasis.

Kaj krom tio la historio montras, ke nur tiam lingvo emas disdialektiĝi, kiam ĝi ankoraŭ ne havas fiksitajn kaj registritajn gramatikojn. Sed tuj, kiam lingvo fariĝas kultura esprimilo, la disĝaj fortoj ŝanĝiĝas en fortojn unuigajn. Ĉiuj kulturaj lingvoj nuntempe montras pli da unueco ol antaŭ kelkaj jarcentoj. Ke en estonteco al Esperanto okazos same, pri tio ni ne dubas.

een toestand uitdrukt, en geen werking. Maar de drang of noodzaak een werkwoord te gebruiken komt natuurlijk voort uit het feit, dat men de verhouding soms als een werking aanvoelt. Zo is *superi* iets meer dan eenvoudig *esti super io*; evenzo zijn *transi* en *antaŭi* eerder resp. *iri trans io* en *iri antaŭ io* dan *esti*. En *kontraŭi* is beslist *agi kontraŭ io*.

Grammaticaal is natuurlijk van elk voorzetsel een afleiding mogelijk, maar praktisch zijn bijv. *proi* en *dei* onbestaanbaar, terwijl afleidingen van *al*, *ĉe*, *dum*, *ekster*, *el*, *en*, *ĝis*, *inter*, *kun*, *por*, *pri*, *sen*, *sub* en *sur* wel zouden betekenen respectievelijk *iri al io*, *esti ĉe io*, *okazi dum io* e.d., maar aan zulke afleidingen wordt nooit behoefte gevoeld. In een brief vonden wij eens: *ĉi kunas.... (hierbij gaat....)*. Afleidingen als *apudi* (= *esti apud io*), *kromi* (= *esti, okazi krom io*), *laŭi* (=

*esti konforma al io*), *malgraŭi* (= *spiti ion*), *posti* (= *iri post io*, te gebruiken bijv. in: *de klok loopt achter = la horloĝo postas*), *preteri* (= *iri preter io*) en *trai* (= *penetri ion*) zijn goed te gebruiken, maar komen slechts zelden voor. De meest voorkomende voorzetsel-werkwoorden zijn *anstataŭi* (vervangen, de plaats innemen van), *antaŭi* (iemand of iets voor zijn, voorlopen, de klok loopt voor = *la horloĝo antaŭas*), *ĉirkaŭi* (omgeven, rondom zijn, omringen), *kontraŭi* (tegenwerken, verhinderen, een tegenstelling vormen), *peri* (bemiddelen), *superi* (overtreffen, overheersen, te boven gaan) en *transi* (naar de overzijde voeren, *la ponto transas la riveron*).

De praktisch mogelijke voorzetsel-werkwoorden hebben in het gebruik meestal een overgangelijke betekenis gekregen.

(Wordt vervolgd)

## KIO OKAZIS ANTAŬ 1949!

Pri tio informas vin **Gvidilo tra la Esperanto-movado** (kun suplemento), de G. P. de Bruin. La sola verketo kiu raportas ankaŭ pri la laborista Esperanto-movado. **Prezo f 0.95.** Mendu ĉe la **Libroservo!**

